TEJO-aktuale: numero 338, 2012-12

### TEJO-aktuale paŭzas!

Karaj legantoj, pro translokiĝo de la redaktorino kaj partopreno en la jarfinaj aranĝoj la dissendo de TEJO-aktuale paŭzos. Dankon por via kompreno kaj ĉion bonan por vi.

### Proponu nun temojn por la diskuto pri TEJO-rilataj temoj dum JES

En Junulara E-Semajno oni intencas diskuti pri temoj tre signifaj por TEJO. Kiun interesas neŭtraleco en Esperanto-organizoj? Esprimiĝu ĉe: https://www.facebook.com/junularaesemajno/posts/464982370219214

### TEJO serĉas grafikiston!

Se vi havas kreivan menson kaj lertajn manojn, tiam tiu ĉi mesaĝo estas por vi. Ĉu okazis al vi ke vi volis informi pri Esperanto al eksteruloj sed simple havis nenion por enmanigi al ili? Aŭ ĉu vi ŝatus helpi al la Landaj Sekcioj ekhavi tiajn varbo-materialojn? Aŭ ambaŭ? :)

Ni preparas mallongan trafan informilon pri Esperanto kaj TEJO kiu estu facile tradukebla al aliaj lingvoj, kaj kies lokajn versiojn la aktivuloj en diversaj landoj povos utiligi kiel flugfoliojn dum informado. Ĝuste vi povus helpi krei ĝian aspekton tiel ke ne nur la enhavo estu informplena, sed ankaŭ la vizaĝo estu alloga. Interesita? Kontaktu nin: informado ĉe tejo.org .

### La fonduso "JES al novuloj" petas subtenon

La fonduso "JES al novuloj" ricevis tro multe da BONEGAJ kandidatiĝoj. Se vi volas finance subteni junulon, kiu bone parolas Esperanton sed ankoraŭ neniam povis ĉeesti kongreson, kaj sen subteno ankaŭ ĉijare ne povos ĉeesti, bonvolu skribu kiel eble plej baldaŭ al jes.al.novuloj ĉe gmail.com.

### [Karavano al JES 2012/2013 en Naumburg] Pretas la retpaĝo

*Malsukcesa elŝuto.*

### 3-a datreveno de la paĝo de UEA en Facebook

5an de novembro, en la 3-a datreveno de la paĝo de UEA en Facebook, la paĝo havas jam 3160 ŝatantojn. Ĉu post unu jaro jam 4000? Rigardu: http://www.facebook.com/Universala.Esperanto.Asocio

### 10-a Internacia Himalaja Renkontiĝo, Katmando, Nepalo, 26a de februaro ĝis la 11a de marto 2013

Konigi la mondon al Nepalo, kaj Nepalon al la mondo per Esperanto
Nepala Esperanto-Asocio ĝojas anonci la 14-tagan Internacian Himalajan Renkontiĝon 2013 por konigi sian landon al alilandaj esperantistoj. Apenaŭ ekzistas iu lando en la mondo kiu povus rangi samnivele kun Nepalo rilate al natura, etna kaj kultura diverseco. Partoprenante la Renkontiĝon, vi havos ŝancon formi vian propran bildon de la lando kaj samtempe konatiĝi kun lokaj kaj alilokaj esperantistoj kiuj partoprenos la samajn programerojn. Ni bonvenigas ankaŭ homojn kiuj volas komenci lerni Esperanton dum la Renkontiĝo. La programo estas planita por ke ĝi taŭgu al ĉiuj aĝgrupoj.

Por pliaj informoj kontaktu: Nepala Esperanto-Asocio, G.P.O Box: 10518 Kathmandu, Nepal. Telefono: 00977-1-6209877. Retadresoj: nespa.1990 ĉe gmail.com aŭ luno1962 ĉe gmail.com.

### Helpopeto de UEA por la muzikgrupo Amindaj el Kubo

Uragano Sandy kaŭzis terurajn damaĝojn al domoj de Amindaj-anoj, ĵaŭdon la 25-an de oktobro. Kantisto Guillermo raportis ke duono de la tegmentoj kaj de Graciela kaj de Gricel estis detruitaj. Pri la domoj de aliaj mi ne aŭdis, sed verŝajne estis aliaj perdoj pro la feroceco de la ŝtormego. UEA-prezidanto Probal Dasgupta petis esperantistojn helpi pri la necesa rekonstruado, kaj eks-prezidanto Renato Corsetti proponis helpon fare de Fondaĵo Espero de UEA. Certe ajna helpo estas bonvenega. Rigardu:
http://i2.cdn.turner.com/cnn/dam/assets/121025084504-05-hurricane-sandy-1025-horizontal-gallery.jpg

## Novaĵoj de Vinilkosmo

- "Sonsistemo" estas unu el la kantoj aperantaj en la disko "Civilizacio" de "Strika Tango". Fizika KD disponebla ĉe: http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkkd70&.

- Tri projektoj de albumoj de metala muziko kadre de la promeskampanjo de Vinilkosmo: BaRok', Krio de morto, Supernova

se vi ŝatas metalon, pezan rokon , industrimetalon, ktp.. antaŭmendu, subtenu tuj tiujn album-projektojn ĉe: http://goo.gl/5pvMO

- Floréal Martorell ricevis la ĉi jaran FAME-premion. Legu pli: http://www.ipernity.com/blog/vinilkosmo/426080?lg=en&hash=d09b343e3d87a24c22c44289318b0319

- Malkovru "Jim Petit kaj siaj glit-gitaroj": http://www.ipernity.com/blog/vinilkosmo/426520

- Apero de la 1a albumo de la "Promeskampanjo" - "Okcitanio" de PATRIC. Legu pli: http://www.ipernity.com/blog/vinilkosmo/426980

- Jen bonega prezento de la nova albumo "Okcitanio" de Patric ĉe Pola retRadio ! Legu pli kaj aŭskultu en nia blogo ĉe: http://www.ipernity.com/blog/vinilkosmo/429645

## Venontaj renkontiĝoj

29a IF, Dortmund, Germanio, 27a de decembro 2012 ĝis 3a de januaro 2013 http://www.internacia-festivalo.de
Novjara Renkontiĝo / NIS, Xanten, Germanio, 27a de decembro 2012 ĝis 3a de januaro 2013 http://www.esperantoland.org/nr/index.shtml#alighilo
31a Komuna Seminario 2012, "Takaonomori Wakuwaku Village" apud Monto Takao, en Urbo Hachioji en Tokio, Japanio, 28a ĝis 30a de decembro 2012, https://sites.google.com/site/komunaseminario2012/esperanto
Jarfina FESTEego kun Silvestra-Novjara FESTeno, Esperanto-kastelo Gresillon, Francio, 28-a de decembro 2012 ĝis la 2a de januaro 2013, http://www.gresillon.org/jarfino
4-a Junulara E-Semajno, Naumburg, Germanio, 28a de decembro 2012 ĝis 4a de januaro 2013, http://www.facebook.com/junularaesemajno kaj http://www.jes.pej.pl
4-a NOVA - Novjara Aranĝo, Praia da Pipa, RN (Norda Riogrando), Brazilo, 3a de januaro ĝis 6a de januaro 2013, http://novjaraaranĝo.wordpress.com/ (atentu: g x estas ĝusta retadreso)
Post-JES-festo en Berlino, Germanio, 5a de januaro 2013, https://www.facebook.com/events/321141581334134/
1a aktivula trejnado de BEJO, Bienlernejo Bona Espero, proksime de la ĉefurbo Braziljo, Brazilio, 10-a ĝis la 16-a de januaro, bejoesperanto ĉe yahoo.com.br
33a Brazila Esperantista Junulara Kongreso, kune kun la Brazila Kongreso de Esperanto, Barra do Garças, Brazilio, 16-a de januaro ĝis 20-a de januaro, bejoesperanto ĉe yahoo.com.br
Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu